

Theodor Storm,

## La urbo

*tradukita de Richard Schulz*

Ĉe griza strand', ĉe griza mar',  
 Jen kuŝas la urbet'.  
 Nebulo ondas trans digar',  
 Kaj muĝas tra l' silent' la mar'  
 Proksime de ' urbet'.

Susuras ne arbar'. Sen ĉes'  
 Ne kantas maje birda par'.  
 En nokt' autuna preter gres'  
 Kaj griza strand' kun kriagres'  
 Flugmigras anserar'.

Sed batas mia kor' por ci,  
 Ci griza urb' ĉe l' mar'.  
 La ĉarm' de la junec' por mi  
 Ridete brilas plu sur ci,  
 Ci griza urb' ĉe l' mar'.

*Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 – †1997-09-26) en 1984.*

*Arg-173-347 (2013-02-26 15:12:58)*

*La traduko estas - kun permeso de la eldoninto, sinjoro Hermann Behrmann, prenita el la libro "La muzino" de Rikardp Ŝulco (Richard Schulz), eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn', Germanujo, en 1992. Ĝi troviĝas ankaŭ en la numero 6/1984 de la GEA-organo "Esperanto aktuell". Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*